
# 5. Katastrofo okazinta la 1an de januaro




La granda tertremo okazis en la duoninsulo Noto la 1an de janruaro 2024, kiam ĉiuj ĝoje festis la novan jaron. En tiu regiono okazadis multaj grandaj kaj

malgrandaj tertremoj dum la pasintaj 3 jaroj, sed neniu antaŭvidis tiom grandegan tertremon de sisma intenso




7. Post la tertremego tuj poste atakis cunamo la marbordajn havenojn, kaj multaj domoj kaj instalaĵoj estis detruitaj, sed preskaŭ neniu mortis pro la cunamo.

Japanio estas tertrema lando. Dum mia vivo 82 jarojn longa la plej impresaj tertremoj estis tertremego de Hanŝin-Aŭaĵi, kiu okazis en la prospera urbo Koobe najbare de Oosaka en januaro 1995 kun 6500 mortoj, kaj Orient-japana tertremego kun grandega cunamo kaj la sekvanta nuklea akcidento en Fukuŝima, kiu okazis laŭ la marbordo de orienta Japanio en marto 2011 kun 20000 mortoj kaj kelkdek mil ankoraŭ nun rifuĝantaj homoj.

Mi loĝas en la mezo de la japana insulo, kie malofte okazas tertremoj kaj neniam cunamo. La plej fortan skuon mi spertis okaze de la tertremego en 2011, sed la forteco estis nur 5-grado de la sismo intenso. En 7-grada tertremo betonaj konstruaĵoj povas fali, kaj en lignaj domoj oni povas morti sub falintaj plafonoj kaj mebloj kaj ankaŭ pro fajroj.

## Kia regiono estas la duoninsulo Noto?




La ĵurnalo Akahata, la 29an de januaro

La supra foto aperis en la ĵurnalo Akahata la 29an de januaro, temanta pri subteno al la Noto-anoj per kaligrafiaĵoj.

Laŭ la klarigo virinoj en la foto iam vizitis la duoninsulon Noto, kaj rememorigante la ĝojajn tagojn ili kaligrafiis. De dekstre en la dua vico jene estis skribitaj:

1. Bela Noto
2. Urboj kun nigraj tegoloj
3. Bongustaĵoj el la maro kaj la montaro
4. Lumturo ĉe la kabo

5. Mil verdaj rizkampoj

6. Tradiciaj lakaĵoj nomataj "Ŭaĵima-nuri" (suba foto)



En la unua vico, de dekstre:

1. Prospera Matena Foiro

2. Bongustaj Noto-bovaĵoj

3. La iama ĉampiono de Sumoo Ŭaĵima deveninta de la urbo Ŭaĵima

4. Varmfonto kun beliga efiko

5. Mi ne volas la nuklean centralon Ŝika en Noto

6. Okaze de ebla nuklea akcidento la loĝantoj ne havos rimedon kaj vojon por fuĝi

7. Kuraĝon al Noto!

Tiu ĉi foto, kiu prezentas ĉarmojn de Noto, estas tre bona. Ni povas bone kompreni, kiel bela kaj vizitinda estas la duoninsulo Noto.

Mi vizitis ĝin du-foje, la unuan fojon kiam mi estis studento, kaj la duan fojon antaŭ 20 jaroj. Okaze de la dua vizito mi vizitis tiun Matenan Foiron kaj aĉetis lakaĵojn. Dum tiu ĉi katastrofo tiun Matenan Foiron la granda incendio forbruligis, neniigante ĉiujn vendejojn kaj ĉiujn metiejojn de la lakaĵoj.

La aliaj ĉarmoj de Noto multe vundiĝis.

## Kio okazis dum la 10 tagoj ek de la tertremo?

Mi nun skribas tiun ĉi raporton la 29an de januaro, 4 semajnojn post la katastrofo, sed ankoraŭ la tuta damaĝo ne estas klara. Mi skribos raporton laŭtage ĝis la 10a de januaro, montrante rublikojn aperintajn en tri ĵurnaloj, Asahi, Mainiĉi kaj Akahata, kiujn mi abonas.

## La 3an de januaro (Asahi)

* La 2an oni ne eldonas ĵurnalojn.


14版 2024年(令和6年)1月3日(水) 朝日新聞

能登震度7 55人死亡

M7.6 200棟以上火

火災が続く輪島市の市街地＝2日午前8時20分、石川県輪島市、本社機から、嶋田達也撮影

石川県能登地方を震源
い地震が1日午後4時
り、同県志賀町で最大震
測した。気象庁によると
深さは約16㌔。地震の規
マグニチュード（M）は
6で、この地域では記録
885年以降で最大だっ

各地の震度は
の輪島市と珠洲
市、穴水町で震
同県中能登町と

各地の主な震度
1月1日 午後4時10分 発生

日航機炎上 海保機

羽田空港 乗員乗客 全

2日午後5時50分ごろ、東京都大田区の羽田空港C滑走路で、着陸しようとした日本航空（JAL）の516便と、滑走路上にいた海上保安庁の航空機が衝突し、双方が炎上した。警視庁や東京消防庁によると、海保機の5人が死亡し、JAL機の乗客・乗員少なくとも17人が負傷した。

▼3面＝運輸安全委に調査依頼、30面＝衝撃と煙

海保5人死亡 機長重傷

海保機は能登
の救援のため、
基地に向かおう
たという。
国土交通省に
JAL機が南側
しようとした際
路上にいた海

La granda tertremo Noto, sismo intenso 7. Mortis 55 homoj. Magnitudo 7,6, pli ol 200 domoj estis bruligitaj. 32000 homoj rifuĝis.

Je la 16:10 la 1an de januaro okazis granda

tertremo en la duoninsulo Noto. En la urbo Ŝika oni mezuris la sisman intenson 7. La forteco de la tertremo estis magnitudo 7,6, la plej forta en tiu ĉi regiono ekde 1885, kiam oni komencis mezuri.

Atakis la urbojn malfortiĝintajn de la oftaj tertremoj. En 2022 okazis tertremo de la sisma intenso 6-, en 2023 sisma intenso 6+. La domoj ankoraŭ ne riparitaj sinsekve falis.

Ŝajnas, ke fendego 150-kilometrojn longa moviĝis.

En la duoninsulo Noto oftis tertremoj. Ĝis la fino de 2023 okazis pli ol 500 tertremoj fortaj je sisma instenso 1 aŭ pli. La kaŭzo ne estas klara, sed la komitato de sismaj esploristoj supozas, ke troviĝas masego da likvaĵo en la fundo, kiu premas rokarojn kaj fendegojn, kaj kaŭzis ĉi-fojan tertremon..


毎日新聞
かな元日に激震
能登震度7
朝市通り火の
住民「言葉に

**La 3an de januaro (Mainiĉi)**
Kvietan novjaron atakis la granda tremo. Matena Foiro estas en la flamoj. Loĝantoj diras, “Ne imageble!”

Matena Foiro estas fama turisma loko en la urbo Ŭaĵima, kiu havas 1300 jarojn da historio. Ĉiun matenon vicis 200 malgrandaj vendejoj, kiuj vendas fiŝojn, legomojn, ĉiutagajn necesaĵojn kaj tradiciajn metiaĵojn. Turistoj vizitas ĝin por butikumado. Sed la kvartalo tute forbrulis kaj ĉio malaperis.

Foto: s-ro Azuma kaŭras kun larmoj antaŭ sia falinta domo. Lia fratino Joŝimi kaj ŝia filino estis kaptitaj en ĝi, kaj ŝi estis trovita morta, kovrante sian filinon. La filino estis transportita al la hospitalo. Antaŭ li estas metitaj ludiloj de la filino.

La marbordojn atakis la cunamo. Fiŝŝipoj renversiĝis. Okazis multaj terfaloj. Lernejoj estas plenaj de rifuĝintoj.

En iu lernejo, kiu estis registrita kiel rifuĝejo por 290 homoj, kolektiĝis 700 homoj. Mankas lankovriloj, hejtiloj kaj necesejoj.

**La 4an de januaro (Asahi)**

73 homoj mortis kaj 15 homoj malaperis en la urboj Ŭaĵima kaj Anamizu.

Sub la rubaĵoj estas familianoj.

La nacia vojo estis rompita.

72 horoj post la tertremo venos baldaŭ.

En Ŭaĵima 7-etaĝa konstruaĵo falis kaj subpremis la najbaran domon, en kiu ankoraŭ restas homoj. La

policanoj kaj fajrobrigadanoj provas savi ilin, sed oftaj tertremoj malhelpas iliajn agadojn. Onidire post 72 horoj tiuj kaptitoj ne povos plu vivi. Komunikado ne funkcias, akvo, manĝaĵoj tute mankas.

**La 4an de januaro (Mainiĉi)**

La urbo Suzu estis tute detruita. Ĝi aspektas kvazaŭ la urbo bombardita kaj bruligita.

La urbestro de Suzu s-ro Izumija klarigis, "6000 domoj en la urbo estis tute aŭ preskaŭ detruitaj. La stratoj estis blokitaj de la falintaj domoj kaj elektraj fostoj, tial liveri savomaterialojn estas tre malfacile".

Elektro mankas al 31800 domoj en 6 urboj en la duoninsulo Noto. Komunikado per poŝtelefonilo kaj saĝtelefonilo malfacilas.

**La 5an de januaro (Mainiĉi)**

Mortintoj estas 92 kaj malaperintoj 242. La urbestro de Ŭaĵima diris, "En Ŭaĵima pli ol 100 homoj estas sub la falintaj domoj. Ni provas unue savi tiujn, kies voĉoj estas aŭdeblaj".

Hospitaloj: "Ni kuracas, uzante tion, kion ni havas."

Al la hospitalo en la urbo Nanao venis ĝis la 4a de januaro 185 pacientoj, el kiuj 8 estis seriozaj kaj unu estis morta. La kuracistoj kaj geflegistoj mem suferas pro la katastrofo kaj la konstruaĵoj difektiĝis. Ili penas,

sed gravas manko de akvo. Diabetuloj ne kuraceblaj sen akvo estis transsenditaj al la ĉefurbo Kanazaŭa. La estro diris, “Manko de akvo kaŭzas higiene tre krizan situacion. La vintro ĉi tie estas tre severa, do se la rifuĝintoj vivos longe en tiu ĉi mizera stato, multiĝos malsanuloj. Estas necesa sufiĉa helpo pri materialoj kaj kuracado”.

## La 6an de januaro (Mainiĉi)

Pli ol 100 homoj estas sub la falintaj domoj.

La nombro de mortintoj estas 94. La nombro de malaperintoj estas 222.

Tute ŝanĝiĝis la pejzaĝo de la fiŝkaptistaj urbetoj pro la cunamo.

Vintro estas la sezono por kapti krabojn kaj seriolojn, sed pro la cunamo la havenoj, instalaĵoj kaj ŝipoj estis detruitaj. Krome en iuj marbordoj la tero leviĝis 2-4 metrojn, kio malebligas la uzon de la havenoj. Iu en la fiŝkaptista asocio diris, “Enketinte pri kelkaj havenoj, mi informiĝis, ke la situacio estas malesperiga. En decembro ni estis ĝoja pro riĉaj kaptaĵoj, sed nun ni ne plu povos esperi tion. Mi timas, ke ni suferos pli pro serioza damaĝo. Kiam ni povos komenci fiŝkaptadon, tion ni ne povas antaŭvidi.”

## La 6an de januaro (Asahi)

Izolite, koro estas en la sojlo de rompiĝo.

Kiam venos la savo?

Ĉiun fojon kiam okazas tertremo, mia filino kroĉiĝas al mi.

La familio de s-ro Kaŭasaki el Kioto estis atakita de la tertremo dum la vojaĝo. La familianoj rifuĝis al la proksima publika kunvenejo kaj pasigis tri noktojn. Lia 10-jara filino kriis ĉiun fonon je tertremoj kaj kroĉiĝis al sia patrino, dirante, "Mi ne volas morti!" Li decidis fuĝi per sia aŭtomobilo eksteren, riskante vivon, kaj finfine 8 horojn poste li atingis la urbon Kanazaŭa. Li diris, "En la izolita vilaĝo ni ne sciis, kio okazos la sekvan tagon, eĉ ne sciis pri vetero. Mi esperas, ke la rifuĝintoj estos savitaj kiel eble plej frue."

Ekestos rilatantaj mortoj

Troviĝas multaj gemaljunuloj en rifugejoj, kiuj bezonas medikamenton. Kuracisto Jokobori timas, ke ekaperos mortoj pro manko de medikamentoj, malbona higieno kaj malbona vivkondiĉaro (nomataj "rilatantaj mortoj")

**La 7an de januaro (Mainiĉi)**

Tertremaj mortoj 126, malaperoj 210. Ankoraŭ ne videblas la tuto.

En la 14 urboj kaj vilaĝoj 66400 familioj ne ricevas akvon kaj 23200 familioj ne ricevas elektron. Tertremoj daŭre okazadas: ekde la 1a de januaro 1000

tertremoj de sisma intenso 1 aŭ pli okazis. En rifuĝejoj loĝas pli ol 30 000 homoj, el kiuj gemaljunuloj estos akceptitaj en hoteloj ekster la duoninsulo.

Virinoj en 90-aj jaroj estis savita post 124 horoj

Nokte de la 6a de januaro virino subpremita en la unua etaĝo estis savita post 124 horoj post la tertremego. Ŝi kuŝis sur la lito kaj ŝiaj kruroj estis kaptitaj, sed ŝi povis paroli.

**La 8a de januaro (Mainiĉi)**

30000 homoj loĝas en rifuĝejoj. Troviĝas 290



rifugejoj, el kiuj 213 estis mem preparitaj de la loĝantoj en temploj, privataj domoj kaj forcejoj.

En novjaro pli multaj homoj estis en la duoninsulo kiel revenintaj familianoj kaj turistoj ol la supozata nombro, tial mankas oficiale instalitaj rifuĝejoj. Por tiuj superfluaj homoj loĝantoj mem preparis rifuĝlokojn.

**La 8a de januaro (Akahata)**

Kuŝas kaj dormas sur malvarma planko. Ankaŭ hodiaŭ nur unu pano. Fekaĵoj estas "konservitaj".

Troviĝas homoj, kiuj finfine en la 7a povis baniĝi, homoj, kiuj "konservas" fekaĵojn hejme, homoj dormas en viciĝantaj aŭtomobiloj en parkejoj, homoj, kiuj volas porti mortintajn familianojn al kadavrometiejo, ĉar la kremaciejo ne estas uzebla. La higiena situacio estas la plej malbona.

**La 9an de januaro (Akahata)**

Post unu semajno mortintoj 168, malaperintoj 323.

Vojoj estas multloke baritaj,



krome pro la neĝo la nacia vojo estis neuzebla. Vilaĝoj laŭ la marbordo kaj en la montaro estas izolitaj kun minimume 3000 loĝantoj
Foto: En neĝo policanoj serĉas malaperintojn en detruitaj domoj.

**La 10an de januaro (Akahata)**

Mortintoj 202, malaperintoj pli ol 100.

"Ne antaŭvidebla estas remalfermo de hoteloj", hotelposedanto en la varmfontejo Ŭakura estas senespera.



Ŭakura estas fama turisma loko kun 22 hoteloj. Ĉiuj hoteloj difektiĝis. Unu el la hotelposedantoj diris, "Ni longe suferis pro la kronvirusa pandemio, kaj ni esperis, ke en 2024 multaj turistoj venos.

Sed pro la tertremo ĉiuj mendoj en novjaro estis nuligitaj. Mi ne scias, kiamaniere mi povos remalfermi la hotelon. Mi timas, ke en tiu ĉi jaro ne venos turistoj”.

**La 10a de januaro (Asahi)**

Lernejoj estis damaĝitaj. La komenciĝo de la tria semestro prokrastiĝis en 9 urboj kaj vilaĝoj.

La 9an de januaro en preskaŭ ĉiuj elementaj kaj mezlernejoj en Japanio komenciĝis la tria semestro, sed en multaj lernejoj en la duoninsulo Noto la tria semestro ne komenciĝis. Ankaŭ en la superaj mezlernejoj ne komenciĝis la tria semestro.

Junaj gelernantoj havas malfacilojn en rifuĝejoj. Ili ne povas ricevi sufiĉajn zorgojn. Por tiuj lernantoj volontula grupo “Katariba” (Babilejo) pretigis 3 lokojn en du urboj por ke ili povu libere ludi. Ĝi planas havi pli da lokoj en aliaj urboj.

Por la lernantoj de superaj mezlernejoj januaro estas la monato, en kiu okazas la tutlanda ekzameno por universitatoj. Iuj perdis librojn kaj eĉ dokumenton por la ekzameno, krome ili devas iri al la ĉefurbo de la gubernio por ekzameno. Iuj timas, ke ili devos ŝanĝi sian planon por la estonteco.

**Diferencoj inter la du katastrofoj en 2011 kaj en tiu ĉi jaro**

En 2011 mi multfoje vizitis la urbojn kaj vilaĝojn damaĝitajn de la tertremo kaj la cunamo laŭ la pacifika marbordo de la Orienta Japanio. Krom la nuklea akcidento en Fukuŝima, jene estas diferencoj inter la tiama kaj ĉi-jara katastrofoj:

1. La katastrofo de 2011 okazis la 11a de marto (ankoraŭ malvarme, sed jam printempe) kaj en la regionoj, kie ne neĝas multe, male la ĉi-jara katastrofo okazis en januaro, nome en la monato plej malvarma kaj plej neĝa.

2. En la katastrofo de 2011, multege da domoj estis damaĝitaj kaj forfluigitaj de la cunamo, sed ne multaj domoj kolapsis pro la tertremo. En ĉi-jara katastrofo multegaj domoj kolapsis kaj baris la vojojn. Tertremoj dum la pasintaj 3 jaroj en tiu duoninsulo malfortigis domojn, kaj pli malbone estis, ke troviĝas multaj malnovaj domoj el lignoj, kiuj facile kolapsis. Elektra kaj akva sistemo estis damaĝitaj, tiel ke la rifuĝintoj suferas multege kaj longe.

3. En 2011 ja estis detruitaj de la cunamo la vastegaj regionoj kaj viktimiĝis multege da homoj (20 000), sed ekster tiuj damaĝitaj lokoj oni normale vivis, do oni povis relative facile sendi savotrupojn kaj savomaterialojn, tamen ĉi-foje la tuta duoninsulo estis damaĝitaj: la vojoj estis detruitaj de multege da terfaloj kaj baritaj de falintaj konstruaĵoj. La havenoj fariĝis

neuzeblaj pro teraltiĝo (en iuj havenoj la tero leviĝis 4 metrojn, do la havenoj fariĝas senakvaj). Multaj homoj preskaŭ izolite loĝas en montaro. Tial nek tere, nek mare estis malfacile atingi tiujn izolitajn vilaĝetojn. Krome la vetero estas tre malbona, tial eĉ post 4 samajnoj multaj homoj vivas en rifuĝejoj aŭ duondifektitaj domoj sen elektro kaj sen akvo en falanta neĝo.

4. En 2011 la nuklea akcidento malfaciligis kaj ankoraŭ malfaciligas la vivadon de Fukuŝima-anoj. Se okazus simila akcidento en la nuklea centralo Ŝika en la duoninsulo Noto, same granda tragedio atakus la loĝantojn. Ni povis eviti la akcidenton, do tio estas feliĉo el la malfeliĉoj.

Alia feliĉo estas, ke la loĝantoj rezignigis al Hokuriku Elektra Kompanio (HEK) konstruadon de la nuklea centralo Suzu ĉe la pinto de la duoninsulo Noto. Laŭ la plano en du lokoj estos konstruitaj po du reaktoroj. Sed pro la kontraŭmovado kaj aliaj kondiĉoj HEK deklaris haltigon de la plano. Se HEK sukcesus la konstruadon, certe okazus grandega nuklea akcidento same kiel en Fukuŝima en 2011.

Hodiaŭ estas la 29a de januaro, 4 semajnojn post la katastrofo, sed al mi ŝajnas, ke nenio solviĝis. Sube estas la ĝisnuna situacio:

| | |
|---|---|
| Mortintoj: | 238 (el ili 15 rilatantaj mortoj) |
| Malaperintoj: | 19 |
| Rifuĝintoj: | 14512 |
| Tute aŭ parte detruitaj domoj: | 44926 |
| Senakvaj familioj: | 41590 |

Eble post unu aŭ du monatoj mi povos raporti pri la sekvo de tiu ĉi katastrofo.

**Preskaŭ okazis granda nuklea akcidento en Noto**

En Japanio estas 54 nukleaj reaktoroj, inter kiuj 10 en Fukuŝima estas malkonstruataj. Unu el la 54 estis la nuklea centralo Ŝika en la urbeto Ŝika, kie oni mezuris la plej fortan sisman intenson 7. Kiam mi aŭdis la novaĵon de ĉi-foja grandega tertremo, unue mi timis



gravan nuklean akcidenton en Ŝika (foto).

En la duoninsulo Noto estas la nuklea centralo Ŝika kun du reaktoroj posedata de Hokuriku Elektra Kompanio (HEK). Laŭ la klarigo de HEK en la 3a de januaro jenaj problemoj okazis, sed radioaktivaĵoj ne flugis eksteren, kaj la cunamo nenion damaĝis.

1. El la du akvokonservejoj en la reaktorodomoj tralikiĝis respektive 95 litroj kaj 326 litroj da akvo,

2. En la unua reaktoro pumpilo haltis dum 40 minutoj,

3. Transformilo difektiĝis kaj elektro fariĝis ne ricevebla, tial oni uzas elektron el alia fonto kaj plu malvarmigas la akvon.

La 4an de januaro HEK jene aldonis: la akvonivelo alitiĝis je 3 metroj en la akvujo, al kiu estas enkondukita akvo per la subtera tubo 500 metrojn longa. HEK klarigis la 2an de januaro, ke neniu ŝanĝo okazis en la akvujo.

La 6an de januaro HEK plu aldonis: en la radiuso de 30 kilometroj estis instalitaj 118 dozmetroj, sed el ili 14 ne funkciis, kaj la HPL ne povas ricevi datumon pri radioaktiveco. Ĝi klarigas, ke dozmetroj instalitaj pli proksime de la centralo funkcias kaj ne estas mezurita radioaktiveco.

Tiamaniere, same kiel ĉiuj aliaj elektraj kompanioj, ankaŭ HEK ŝajnigis la problemojn malgrandaj, sed pli kaj pli da problemoj klariĝis. Mi suspektas, ke HEK kaŝas pli gravan difekton, aŭ ke jam tralikiĝis

radioaktivaĵoj eksteren. Ni ne povas vidi, nek senti, nek flari radioaktivaĵojn. Mi suspektas, ke la loĝantoj jam elmetigis al tiuj.

Kiel vi vidas en la suba mapo, troviĝas multaj fendegoj ĉirkaŭ la nuklea centralo Ŝika, kaj multaj suspektas, ke la centralo estis konstruita sur tiu danĝera, malpermesita tereno, sub kiu kuras fendegoj. La reaktoroj estas konektitaj per tiel multege da grandaj kaj malgrandaj tuboj, ke en grandega tertremo kiel ĉi-foja certe okazas rompiĝoj de tiuj tuboj, kio kondukas al grandega akcidento.




Krome kiam okazos grava akcidento, la loĝantoj devos fuĝi. Sed klariĝis, ke en Noto ili ne povos fuĝi pro la blokitaj vojoj, pro neĝo kaj pro nefunkciiĝo de havenoj pro teraltaĝo. Multaj nukleaj

centraloj en Japanio situas en similaj kondiĉoj kiel en Noto.

En la tertrema lando Japanio oni ne povas garantii sekurecon de la nukleaj centraloj, nek sekuran rifuĝon de la loĝantoj. Tamen la ĉefministro plu insistas la uzadon de la nuklea energio. Por li ankoraŭ pli gravas mono, ol la vivo de la japanoj.